


Brazilano premiita en Belarta Konkurso



La brazila komponisto Flávio Fonseca ricevis la unuan premion en la branĉo kanto de Belarta Konkurso de UEA/1993, pro la muziko "Babelturo".

Lastatempe estas rimarkinda la granda kresko de la esperanta muzika produktado en la tuta mondo. Kompreneble, Belarta Konkurso spegulas tian kreskon.

Flávio Fonseca kiel komponisto ĉiam laboris en tiu kampo, uzante Esperanton en siaj koncertoj kaj diskoj. Tial, tiu premio estas meritita rekono de lia valoro.
Paĝo 3

Ĉi-numere

Ĉu vi scias, ke nia esenco estas kiel tiu de la muŝoj? Paĝo 6

La ekspansio de la suno bruligos la teron. Paĝo 7

La agado de la esperantistaro en Bahia.
Paĝo 4

INTERVJUO

Estas situacioj, kiujn ni travivas nur danke al Esperanto

La prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo, Amilton Reis, estis intervjuita de la nova redaktoro de Brazila Heroldo, Josenildo Marques, en San-Paŭlo. Li opinias, ke en Brazilo oni havas kutimon atendi ĉion de superaj instancoj kaj nenion iniciati grupe aŭ individue.

Paĝo 3

Brazila Heroldo

Zamenhof Editores

Brazilio, 1993

I Jarkolekto - N-ro 3

FACILA

TRIMONATA SUPLEMENTO POR KOMENCANTOJ

I JARKOLEKTO - N-ro 1



*Kiel
antaŭanoncite,
ĉi-kunas la
inaŭgura numero
de nia trimonata
suplemento por
komencantoj -
Facila. Tralegu ĝin
kaj donu vian
opinion.*

Tre facila, ĉu ne?

Feliĉan novan jaron

Jen la forpaso de alia jaro. En tia epoko kiel kutime estas neeviteble pripensi retrospektive ĉi jaron, kiu forpasas. Oni kutime ekpensas ĉion, kio okazis dum la tuta jaro. Ĉio kio ne realigis ankaŭ estas taksata, nome deziroj, celoj, revoj kaj esperoj. Tiaj aferoj feliĉe ne forpasas sed ili ja renovigas kaj rebriligas en ni, ĉar vivi estas necese.

En tiu ĉi jaro multaj gravaj aferoj ŝanĝigis en nia mondo, multaj aferoj okazadis. Aferoj kiuj evoluigas la homojn kaj ties civilizaciojn kaj aferoj, kiuj detruas la homan dignon. Ĉu oni nur bedaŭru? Certe ne. Oni devas ja lerni per tiaj aferoj.

Estas necese, ke ni kiel esperantistoj akompanu la daŭrecon de tiu ŝanĝigemo. Oni ne povas resti iel "haltitaj en la tempo". Al ĉiu nova ŝanĝigo en la mondo kaj en la socio oni devas alrespondi kun novaj planoj kaj celoj.

Registaro restas for de la pacifika verturvojo

Brazila revo pri novaj merkatoj en Azio povos esti realigita, dum mallonga aŭ meza limtempo, nur per libera iniciato.

Brazilio - La privata iniciato devos preni sur sin, per propraj rimedoj, plilongigon de veturvojo BR-164 (Cuiabá-Porto Velho-Rio Branco) ĝis la raveno de Ilo, en Peruo, garantianta defluon de grajnproduktado de Brazilo cele al la potenciala azia merkato per Pacifika Oceano. La brazila registaro, dum mallonga aŭ meza limtempo, ne interesigas priinvesti en tiun soseon. "Tiu veturvojo ne estas nia prioritato nuntempe", antaŭdiris la ministro pri transporto, Alberto Goldman. "Tio, kion ni havas rilate al monrimedoj en la buĝeto sufiĉas nur por estingi brulegojn", aldonis li.

Malgraŭ la malbonvolo de aŭtoritatoj pri la veturvojo direkte al Pacifiko, sub la preteksto de nesufiĉeco de monrimedoj, la guberniestroj de la statoj Rondonio, Osvaldo Pianna, kaj Akreo, Romildo Magalhaes, laboras por ke la plilongigo de BR-364 estu tuj preta. La Nacia Konfederacio de Industrioj (portugale CNI) apogas la ideon, kaj entreprenistoj kiel Olacir de Moraes, la reĝo de sojo, jam estis konsultataj por preni sur sin parton de monrimedoj.

Tra la veturvojo ĝis Pacifiko, parto de brazila grajnproduktado povos deflue de ŝipegoj per la haveno de Ilo, ŝparante 3.530 marajn meilojn por transporti ĝiajn ŝarĝojn ĝis Japanio. "Estas grava la partopreno de la privata parto en veturvojaj laboroj kaj ni allogos tiun parton al tiaj laboroj", anoncas Alberto Goldman.

"La veturvojo ĝis Peruo eĉ povas esti konstruata, sed ĉiuj naturmediaj legoj devas esti obeataj", deklaras la ministro pri naturmedio Coutinho Jorge, kiu defendas la memvivteneblan disvolvigon por Amazonio, kiun li ne konsideras netusebla klosa. Tamen, laŭ la ministro, iu ajn ellaborado de infrastrukturo antaŭvidita por trairi vastajn areojn de humida tropika praarbaro, ekzemple en la kazo de la plilongigo de BR-364, devos nepre havi Raporton pri Naturmedia Kolizio por aprobi aŭ ne la starigon de tiu veturvojo", defendas Coutinho Jorge.

La prezidanto de Nacia Konsilantaro de Kaŭĉukokulturistoj, Atanagildo de Matos, posteulo de Chico Mendes, klare asertas: "Ni ne estas kontraŭ la konstruado de tiu soseon en neniu okazo. Ni volas nur scii kiu ricevos utilon el tiu veturvojo, ĉar ni ne povas konsenti ke kamaradoj logantaj tie, kie ĝi traigos estos forsendataj kaj la bienestroj posedprenos ĉion". Atanagildo memorigas, ke li eĉ partoprenis en kunsidoj kune kun reprezentantoj de Kanada registaro kaj entreprenistoj, kiuj defendas la konstruadon de tiu soseo ĝis Pacifiko. "Ni ĉiam igas klare, ke plej grave estas elcerpe pridiskuti la Raporton pri Naturmedia Kolizio antaŭ ol preni iun ajn decidon", garantias li.

En Porto Velho, la prezidanto de Asocio de Eksportistoj kaj Importistoj de Rondonio, Roberto Lopes Viegas, informas ke jam estas entreprenoj enradikitaj, kiuj

Bedaŭrinde la evoluo de kulturaj karakteroj ne sekvas tiujn de civilizacio. Ĉi-jaro abundas je ekzemplaj ŝanĝigoj en ekonomia kaj politika kampoj, sed tamen en kulturaj sfero apenaŭ okazis io eksterordinara. Ĉi-rilate ĉiu esperantisto devas konsciigi, ke ni havas taŭgan kulturan revoluciilon: Esperanton. Estas ankaŭ necese menciigi, ke nur kiam ĝi paroligas, tiam ĝi plene spegulas la mondokulturon. Nuntempe pro interplektiĝo de nacioj en ekonomiajn komercmerkatojn pli kaj pli falas la arbitraj bariloj, kiuj malpermesas la alproksimigon de ĉiuj popoloj.

Oni povas konkludi, ke konstante maturigas la cirkonstancoj, kiuj ebligas la agnoskon de Esperanto kiel taŭga ilo de interkompreniĝo kaj mondkultura lingvo.

Al ĉiuj kaj speciale al vi, kara leganto, FELIĈAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVAN JARON.

laboras je eksportado al la azia merkato pere de peruaj havenoj en Pacifiko. La decido de la entreprenistoj rezigni pri la propono konstrui la veturvojon tra la municipo Cruzeiro do Sul kontentigis la akreanajn kampestrojn. "Plej grave estas tio, ke oni ne konstruu veturvojon por detruiri praarbaron", deklaras Atanagildo de Matos.

DU TRIONO DE LA MONDO EN LA CELO

La veturvoja interligo de Brazilio kun Pacifika Oceano tra Peruo ebligas grandajn brazilajn terkulturajn produktistojn aliri al konsumanta merkato, kiu laŭ antaŭvidoj de fakuloj de Unuiĝintaj Nacioj kunligos du trionojn de la monda popolo en la 21a jarcento.

La ekonomio de Sudorienta Azio kreskas trioble pli rapide ol en aliaj regionoj de la planedo, montrante taksojn kvinoble pli altajn ol tiuj konstatataj en Eŭropo dum la ora periodo de Industria Revolucio.

Posedantaj malgrandajn marajn frajtojn, la brazilaj eksportistoj povos oferi siajn varojn per konkureblaj prezoj en merkatoj kiel tiuj de Japanio, Malazio, Indonezio, kaj Ĉinio kaj ankaŭ en la Aziaj Tigroj: Singapuro, Suda Koreio, Hongkongo kaj Tajvano.

La brazila sojo, ekzemple, povos atingi la aziajn merkatojn proponante prezon pli malaltaj ol tiu ofertata de usonaj produktistoj.

FABRÍCIO VALLE

Spiritistoj kaj Esperanto

En Brazilo, preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas spiritistoj, kaj multaj opinias, ke tio estas malbona faktoro, ĉar la adeptoj de la aliaj religioj rifuzas lerni Esperanton, "ĉar Esperanto estas lingvo de spiritistoj".

Rezulte de tio, la esperantistaj spiritistoj, pro ia kulposento, decidis apartigi sian spiritisteccon de sia esperantisteco. "Ni ne miksu la aferojn, kontraŭe Esperanto neniam disvastiĝos ekster Spiritismo", mi jam aŭdis, por ekzemplo.

Ĉiam mi akceptis tiun ĉi teorion, sed lastatempaj meditadoj ŝanĝis mian opinion pri la afero.

Unue mi konkludis, ke ne estas vera la aserto, ke ne-spiritistoj ne lernas la internacian lingvon pro tio, ke "ĝi estas lingvo de spiritistoj". Ververe, ili ne lernas Esperanton pro manko de informoj, kiuj abundegas de multaj jaroj en la spiritisma medio.

Nu, surbaze de tiu ĉi konkludo, mi venis al du aliaj:

1- La spiritistoj devas forlasi la kulposenton kaj pli funde esplori la potencialon por Esperanto en la spiritisma medio. Esperantistaj spiritistoj devas prioritati la laboron por ke preskaŭ ĉiuj spiritistoj farigu esperantistoj.

2- La esperantistaj katolikistoj, protestantoj, ktp, devas pli vigle kaj entuziasme varbi por Esperanto. Tio postulos iniciatemon, planadon, fortajn argumentojn kaj konstantan laboron. Estos utile fondi fakajn asociojn kaj agi kunlabore kun Brazilia Esperanto-Ligo, kiu cetere devas resti neŭtrala kaj apogi ĉies iniciatojn.

Neniu religio povas malvoli Esperanton, ĉar sen ĝi ne estos paco definitiva en la mondo. Ĉu ne la monda paco estas unu el la celoj de la religioj?

Zamenhof Editores

CENTRA OFICEJO - Pro administrataj motivoj nia oficejo en Brasília restos malfermita dum nedefinita tempo. FILIO Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de la Esperanto-instruado Praca Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste - 74.110-090 Goiânia-GO

Brazila Heroldo

Brazilo en Esperanto

Socipolitika, ekonomia kaj kultura ĵurnalo de Zamenhof Editores. Aperas monate.

ADMINISTRADO KAJ REDAKCIO

Praca Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste - 74.119-090 Goiânia-GO
DIREKTORO KAJ ELDONISTO: Fabrício Rodrigues Valle - REDAKTORO: Josenildo Marques - KONSTANTAJ KUNLABORANTOJ: Gilbert Ledon - Adriano Valle (ilustraĵoj) - Marcelo Luiz Brasil - KORESPONDANTOJ: Argentino: Atilio Orellana Rojas - Kubo: Orlando Raola - VERKIS KAJ TRADUKIS POR ĈI TIU NUMERO: Gilson Villas Boas Passos - Hilarina Aires - José Saraiva Matos - Euclides Geraldis de Carvalho - Aristofio Alves - Luiz Alberto Coelho - César Dorneles Soares - FOTIS POR ĈI TIU NUMERO: Esperanta Studgrupo Zamenhof

SUPLEMENTOJ FACILA

Trimonata revuo por komencantoj. Aperigas facilajn artikolojn laŭ la vortolisto de la revuo KONTAKTO (Dumonata socikultura revuo de TEJO). Ĉefredaktoro: Maria Manuela - Kunredaktoroj: James Piton kaj David Bianchini

PANORAMO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO
Jara kajero pri interlingvistiko kaj esperantologio. Aperigas fakajn artikolojn, raportojn kaj intervjuojn. - Redaktoro: Gilson Villas Boas Passos
LIAJ SUPLEMENTOJ NE ESTAS ABONEBLAJ APARTE

Facila

Trimonata suplemento por komencantoj. Aperas kune la la oktobra, januara, aprila kaj julia numeroj de la ĵurnalo Brazila Heroldo.

Direktoro kaj Eldonisto - Fabrício Rodrigues Valle

Ĉefredaktoro - S-ino Maria Manuela

Kunredaktoroj - James Piton kaj David Bianchini

INTERVJUO: Amilton Reis

"Estas situacioj, kiujn ni travivas nur danke al Esperanto"

Josenildo Marques

Kiel en tiu lasta sabato de tiu monato, je la 31-a de Oktobro okazis tre riĉenhava kulturkunveno en Esperanto Asocio de San-Patilo. Amilton Reis, BEJO-prezidanto, gvidis ĝin per tre interesa temo, kies titolo estis Universaleco de Esperanto.

La universaleco de Esperanto laŭ Amilton ne estas tiel absoluta, kiel kelkaj pensas. La okcidenteco de Esperanto estas tuj rimarkebla, ĉar ĝia planinto scipovis eŭropajn lingvojn. Magraŭ kelkaj gramatikaj malfaciloj por orientanoj, rimarkindas la propedŭtika valoro kaj la reguleco de Esperanto. Amilton analizis ankaŭ la leksikajn, sintaksajn kaj morfologiajn facetojn de Esperanto rilate aliajn lingvojn.

Tuj post la kunveno-finiĝo mi intervjuis lin.

BH - Kio en Esperanto plej allogas la brazilajn ĝejnulojn?

Amilton - Mi kredas, ke ĉefe la ebleco vojaĝi malmultekoste kaj ankaŭ konatigi kun homoj el aliaj kulturoj.

BH - Ĉu estas malfacile esti prezidanto de BEJO?

Amilton - Jes, ĉar BEJO-prezidanto laboras precipe sola. En Brazilo oni havas kutimon atendi ĉion de superaj instancoj kaj nenion iniciati grupe aŭ individue. (Feliĉe ekzistas latindaj esceptoj!).

BH - Kiaj rilatoj ekzistas inter BEJO-estraro kaj BEJO-anoj?

Amilton - Kelkaj junaj esperantistoj konsciigis, ke ili ne devas atendi ĉion de BEJO-estraro, nome ili mem estas BEJO. Tio ja estas granda paŝo cele al individuaj kaj lokaj agadoj.

BH - Ĉu la TEJO-politiko iel influas sur la agadon de BEJO?

Amilton - Kvankam ni havas tre bonajn rilatojn kun TEJO, ni ankoraŭ ne sukcesis proksimiĝi bone al ili. Ĉiam restas la TEJO-movado en

Eŭropo kaj la BEJO-movado en Brazilo. Nuntempe kun la laborado de Hilarina Aires kiel kunredaktoro de TT por SudAmeriko, farigos malpli raraj la informoj en Eŭropo pri nia movado.

BH - Kiel rilatas BEJO kaj TEJO nuntempe?

Amilton - Ni jam ne havas suldojn de TEJO kaj ni jam interkonatigis persone. Rimarkeblas sufiĉe granda intereso pri nia agado - ĉefe pro tio, ke TEJO nuntempe emas forigi sian eŭrocentrismon.

BH - Kion vi opinias pri la t. n. interna ideo?

Amilton - Mi pensas, ke la esperantistaro prenis ĝin kiel adobjekton kaj ĉi sinteno kreas religiecan etoson en nia komunumo. Tio tre malfavoras Esperanton en la ekstermovada mondo.

BH - Ĉu vi havas novaĵon pri la venonta baloto en BEJO?

Amilton - Ĝis nun ne prezentigis kandidatoj kaj tial mi iomete afliktigas. Pro personaj kialoj mi ne plu povas fari fruktodonan laboron por BEJO kaj ankaŭ ne eblos repreni la prezidantecon post la fino de mia periodo. Estos tre bedaŭrinde, se la junulara movado refalos en kompletan stagnon. Tio ne okazos se junuloj unuigos en lokaj grupoj kaj ekagados por sia regiono (kiel jam okazas en urboj kiel Goiânia kaj Rio - sekvindaj ekzemploj!).

La elekto de nova BEJO-estraro okazos en Natal-Kongreso - ĝis tiam nepre devas prezentigi skipoj, kiuj pretas antaŭenpuŝi la nacian junularan movadon.

BH - Kiaj estis viaj vojaĝoj kaj amikigoj en Esperantio?

Amilton - Pere de Esperanto mi povis konatigi kun tre specialaj homoj en landoj kiel Meksiko, Francio, Hungario kaj aliaj. Estas situacioj, kiujn oni nur travivas danke al Esperanto.

Flávio Fonseca premiita



La tre konata brazila muzikisto kaj komponisto Flávio Fonseca, ricevis premion en la Belarta Konkurso de UEA, en la branĉo Kanto, pro sia verko "Babelturo".

Flávio, kiu esperantigis en 1980, jam lancis la jenajn diskojn/kasedojn: *Flávio Fonseca* (1982), *Flávio Fonseca en Esperanto* (1986), *Luz do Ar* (1989), *Aerlumo* (1990), *Gosto de Vida* (1985) kaj *Aaron Brazilumas Esperante/Arangoj* kaj muzika direktado (1988).

Laŭ Flávio Fonseca, la muziko-merkado en Esperanto ne sufiĉe bonas, sed kreskas jaro post jaro, kune kun la kvanto de bonaj muzikantoj.

"Miaj albumoj bone vendigas, ĉar mi atingas samtempe la Esperantan kaj la brazilan publikon. Tamen, la ĉefa instigilo por verki kaj eldoni en Esperanto ankoraŭ estas la idealo helpi la disvastigon de la lingvo, ĉar profito kaj la generala rekono estas malgrandaj", li deklaris al Brazila Heroldo.

Belartaj Konkursoj de UEA en 1994

La Belartaj Konkursoj havis en 1993 unu el siaj plej bonaj rikoltoj de la lastaj jaroj. Plej elstare kontribuis junaj iberiaj aŭtoroj, kiuj konkeris ĉiujn premiojn de poezio kaj prozo. Eksterordinara estis la rezulto de kantoj. Tiu branĉo proponas nur unu premion, sed nur malofte oni trafis kanton, kiu meritis ĝin. En 1993 la premio eĉ devis esti dividita inter tri konkursajoj.

En 1994 La konkursoj ne plu invitas fotojn. Ilia branĉo estas forigita pro manko de interesigo. Des pli forta estas la invito al eseistoj, kiuj en 1993 saĝne forgesis konkursi. Kutime ne mankas bonaj verkoj en tiu branĉo, sed lastfoje neniu estis premiinda.

Ĉiuj konkursajoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

- **Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

- **Prozo:** Maksimuma longo 200 tajpospacoj. Tri premioj.

- **Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

- **Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun temo de la 78-a UK: "Azio kaj la mondo". Premio Luigi Minnaja.

- **Kanto:** teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin.

- **Vidbendo:** temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

- **Infanlibro de la jaro:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1992. Unu premio.

Alsendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursajojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1994. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1994. Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj: Unua premio: 380 gld. Dua premio: 266 gld. Tria premio: 152 gld. Luigi Minnaja kaj An-okin: 380 gld. Nova talento (por la plej bona konkuranto antaŭe ne premiita) 266 gld. Infanlibro: 798 gld.


Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono.

Perkomputila babilado

Pli ol 50 esperantistoj el pluraj landoj ofte interbabilas pere la komputil-reto internet. Krome estas baza kurso kaj datŭriga kurso laŭ la libro Gerda Malaperis. Se vi havas eblecon uzi la sistemon en iu universitato aŭ firmao, ne preterlasu tiun okazon. Por alliri la liston vi devas peti vian enskribigo tiele: unue vi tajpas LISTSERV-

@trearn.bitnet kaj sube: Subskribe esper-1; via tuta nomo; post por uzi la servon vi devas tajpi: ESPER-L@trearn.bitnet kaj ek al dialogo.



TEKNIDATA
COMÉRCIO E ASSISTÊNCIA TÉCNICA EM INFORMÁTICA

**NO BREAK
ESTABILIZADORES**

**Rua 5, 15 - Sala 3 - Centro - Goiânia - GO -
(062)229-3332**

Latinameriko: Kiam malfeliĉon kulpas destino

Eduardo Galeano*

Gojanja, Brazilo, septembro 1987: du vagantoj, prifosante rubojn, trovas metaltubon, ĝin rompas per martelo kaj malkovras ian bluluman stonon. La magieca stono disradias lumon kaj aeron kaj estigas ian brilon al ĉio kaj ĉiu ĝin tuŝinta. Ili dispecigas la stonon kaj la erojn disdonacas al la najbaroj, kiuj siavice faras el tiuj lampojn, lumeriĉajn, anim-gojigajn! Kia festo!

Sekvtage ambaŭ viroj vomas. Ili mangis mangon kun kokoso: eble kaŭzus tio. Sed vomas ankaŭ aliaj. Ĉiuj sveligas kaj el iliaj internaj eligas ia korpo-brulifajro. La lumo voras, kripligas, mortigas. Ĝi disentendigas portante de vento kaj pluvo, de muŝoj kaj birdoj.

Temas pri la plej grava atomkatastrofo de la mondhistorio, post tiu de Ĉernobil. Multaj mortis - kiu scias kiom - pli multaj fariĝis poreterne stampitaj. En tiu kvartalo, ĉirkaŭurbo de Gojanja, neniŝis la signifon de la vorto radio-aktiveco kaj neniŝis iam ajn estis aŭdinta la vorton cezio 137.

Eĉ ne unu respondeculon trafis prizono ĝis nun. La kliniko eljetinta la cezio-tubon je atingopovon de iu ajn daŭre kaj ordinare funkcias. Latinameriko estas kontinento de senpuneco.

Ĉernobil rezonas ĉiutage en la



oreloj de la mondo. De Gojanja oni scias plu nenion. Pasintjare Kubo gastigis la radiadmalsanajn infanojn de Gojanja kaj tiu lando faras al ili senpagan kuracadon. Eĉ ne tiu malgranda fakto sufiĉis por mencio en la amaskomunikiloj.

Meksikurbo, septembro 1985: La tero tremas. En tri minutoj mil domoj kaj kaj domblokoj disfalegis.

Neniŝis scias kaj neniam scios, kiom da mortoj okazis dum tiuj horormomentoj en la plej granda kaj plej malfortika urbo de la mondo.

La malnovaj domoj rezistis, ne la novaj, ĉar la projektoj ne antaŭvidis tertremojn. La respondeculoj daŭras senpunaj: la entreprenistoj konstruitaj verajn sablokastelojn, la oficistoj permesintaj la konstruadon en terenoj de

la plej granda geologia depresio de la urbo, la inĝenieroj murde falsintaj la kalkulojn de la fundamentoj kaj de la rezistivo de la konstruaĵo. Ĉiuj plu vivas: senpunaj.

Fine de 1991 la revuo "The Economist" kaj la ĵurnalo "The New York Times" publikigis internan memorandon de Monda Banko (MB), kiun subskribis la ekonomisto Lawrence Summers konfesante la aŭtorecon de la propono laŭ kiu MB kuragigu la migradon de poluaj industrioj al la malpli evoluantaj landoj. Jen la tri kialoj: ekonomia logiko konsilas forjetadon de toksaĵoj en landoj de malpli granda enspezo, malalta polunivelo en malpli alta procento de kancero ĉe frumortantaj homoj. Kelkaj protestoj aŭdiĝis, sed por aserti, ke tion oni faras sed ne diras. Lawrence tamen ne estas superrealisma poeto, sed jes la kreinto de la kapitalista realismo.

Senpune Bajer kaj Dow Chemical produktas kaj vendas en Latinameriko sterkajojn kaj paratizicidojn en Germanio kaj Usono malpermesatajn. Senpune Volkswagen kaj Ford fabrikas kaj vendas aŭton sen filtriloj en Germanio kaj Usono.

(*) Aŭtoro de la libro "La Malfermitaj Vojoj de Latinameriko".

Grupo Zamenhof en la 8a Bahia Spiritisma Kongreso

José Saraiva Matos

Esperanto-Studgrupo Zamenhof partoprenis la 8an Bahian Spiritisman Kongreson, okazinta de la 12 ĝis la 15 de la lasta novembro.

Sub la kunordigado de Salvador Brandão, oni instalas standon en la sidejo de tiu kongreso, konsistanta el spiritismaj kaj nespiritismaj libroj en Esperanto, ĉemizoj, postmarkoj, revuoj kaj multvaria materialo, taŭga por esperanta-informado al tiuj, kiuj dum tiu grava evento, vizitis la ekspozicion.

En la okazo, interalie, ni informis pri la koresponda kurso de BEL, Renkontigo Nordorienta de Caruaru, Kongresoj de Natalo kaj Koreio venontjare, abonado de Brazila Heroldo, ktp.

Nuntempe la Grupo Zamenhof funkcias en la malnova sidejo de Spiritisma Federacio, sed la nuna prezidanto de tiu organizaĵo in-



Dekstren: Osvaldo, Edgar, Aldacy, Saraiva kaj Inácio (sidantaj); Julinda kaj Salvador (starantaj).

formis, ke ni rajtas okupi ĉambron en la nova sidejo de tiu Federacio.

Aliaj aktivecoj

Kiel programite, Aldacy de Souza kaj Osvaldo Fonseca da Ponte partoprenis la Nordorientan Renkontigon en Caruaru (PE),

representante la Grupon Zamenhof kaj Bahia Esperanto-Asociacion, respektive.

Cícero Gabriel Soares instruas Esperanton en Grêmio Espírita "Perseverança e Caridade". Laŭ ni estis informita, li planas instali kurson en la jam multe konata kvartalo Pelourinho (Domo de Jorge Amado).

ĈIUTAGA
EKONOMI-SOCIOPOLITIKO
Gilbert Ledon

La rolo de la ŝtato

Nekredeble, "kiu estas (aŭ kiu devus esti) la rolo de la ŝtato?" estas la demando, kiu starigis FIESP (Federacio de la Industrioj en ŝtato San Paulo) en semajna revuo je septembro 1993. La demando estas despli nekredibla ke, ni ĉiuj scias, la grandaj industrioj ĉiam sukcesis profiti de la ŝtato por arangi privilegiojn en monopoloj, oligarkioj, favoraj kondiĉoj por importado, eksportado ktp. Evidente la ankriistoj antaŭ pli ol 150 jaroj prezentis la saman demandon, kaj tuj donis la plej trafan respondon: la homoj en la organizado de la ŝtato, tute ne bezonas tiun homan institucion, kiu estas la monstra ŝtato, la levjato, ĉar la ŝtato ne plu estas je la servo de la individuo sed estas la individuo kiuj troviĝas sklave ekspluatataj de la institucio. Tiu konstato estas despli klara en nia nuna epoko, kiam la interveno de la institucio estas profunda kaj konstanta en ĉiuj homaj agadoj, ankaŭ en ekonomio, kio sendube pravigas la maltrankviligon de FIESP, kiam nun oni cetere pretendas revizii la konstitucion. Kontraŭe, mirige, laŭ enketo de "Folha de São Paulo", de la 19a de septembro 1993 (kaj la ekspliko nur povas esti nesufiĉa klereco de la brazila popolo), 87% el la intervjuitoj deziras pli kontrolo je prezoj kaj 74% deziras pli da interveno ĝenerala aŭ konservi la nunan intervenon fare de ŝtato...

Preter ĉiuj pliaj konsideroj, se ni legas la difinon de ŝtato en nia Plena Ilustrita Vortaro (PIV) je pago 1070, ni rajtas ektimi: "Politika formo de organizita socio en limdifinita teritorio, kies registaro havas super la tiea loĝantaro regantan, leĝodonan, jurisdikian kaj administracian povon" kaj je punkto 4: "Tuto de la trud-kaj pun-fortoj kaj soci-organoj, kiuj certigas al la ekonomike superanta klaso regadon super la aliaj". Ĉu ĉio ĉi tio ne temas pri monstraĵo?

Monstraĵo kiun ni pasive devas akcepti, ĉar en la praktiko, tiel estas, la rolo de la ŝtato estas tre klara. La reganta klaso estas tiuj politikuloj, kiujn ni ĉiuj konas; la reganta klaso estas la registaro, kiu ludas per la individuo, la civitano laŭ sia kontrolo kaj por varti la monstren, kiu servas je ties interesoj, ne je la interesoj de la nepensanta popolo. Kaj jen por resti en la ĉiutago, 60 impostoj, tributoj, akcizoj ne sufiĉas por elŝuĉi pli ol 50% el ĉio kion ni produktas. Sen konsideri la konstitucion, la registaro kreis la IPMF por depreni pliajn 0,255 el la tuta mono kiu cirkuladas... sendube la "justico" ĉi foje bremsis la aferon, sed ni restu trankvilaj; en januaro ĝi revenos.

Estas malfacile aserti, ke la kontrolo de la sekeco apartenas al la rolo de ŝtato, post Sankta Petro kompreneble, sed kie estas la irigaciaj kanaloj, post elpezo de US\$ 11 bilionoj en 33 jaroj ("O Estado de São Paulo" je 12/09/93)? Ĉu la mono ne estas en la profundeco de la poŝoj de niaj statuloj en konstanta koruptadokun Color, P.C. Farias? El la sama fonto oni citas la escepton de kanalo kun 115 km, kiu transportas la akvojn de rivero Jagua-

ribe al la interlando de Ceará, kaj kiu kostis US\$ 48 milionoj el nia publika mono. Nu, ĉiu leganto povas fari simplan kalkulon, kaj malkovri ke per 11 bilionoj oni estus povinta konstrui 26.350 km da kanaloj! En Usono, laŭdire sen ŝtata mono, la kalifornianoj konstruis 6.000 km kaj transformis la dezerton en eldorado, kiu kapablas nutri la duonon de la usona popolo. Ni do revu pri tiuj irigaciaj kanaloj, kiuj en nia nordorienta "caatinga" alportus la saman eldorado da abundo por nutri la tutan brazilan popolon... tiel, eĉ la "Pampa Respubliko", ne plu havos motivojn por krei apartan ŝtaton!

Intertempe, kiel oni diras, pli ol triono de la brazila popolo sučas je la mamoj de tiu ŝtato, do almenaŭ triono de la legantoj de "Brazilo Heroldo" ne povas akcepti la ideon, ke la ŝtato estas forigenda, senutila monstro. Krome por ordinara homoj kiuj facile malsargas sian individuan respondecon je la kolektivo, sen la ŝtato ne eblas ordigi la socion do... do, ni akceptu la rolon la ŝtato, kiu devas regi nin, iel ajn, eĉ se ĝi estas la plej malbona mastro iam imagebla. Aŭ ĉu la 70-jara eksperimento de ŝtata Komunismo ne estis sufiĉe detrua kaj por la socia ordo, kaj por la individuoj, kiuj gustu perdis sian individuecon kaj memstarecon? Jes, la homoj preferas vegeti en sia absoluta pigro, kaj atendas, ke la ŝtato iel zorgu pri ili per ioma edukado kaj sama prizorgo. Estas ja malpli laciĝe resti en la vicjo por pluki magrajn materialaĵojn ol mem sin streĉi por produkti la necesajn nutraĵojn... Tio estas la rolo de la ŝtato!

Tiuj samaj ordinaraĵoj, sindikatemaĵoj homoj el ĉiuj koloroj lerte manipulitaj de la plej diversaj interesoj, ne sen bataloj akceptas la privatigon de ŝtataj entreprenoj. Ni tamen scias, ke la ŝtataj firmaoj en siaj nepotismoj havas produktivecon multoble pli malgrandan ol la privataj produktosistemoj, kaj la ŝtataj subvencioj estas unu el la kaŭzoj de la inflacio kaj deficito en la ŝtata buĝeto. Ni ankaŭ scias, ke kiam privata entrepreno ne sukcesas ekvilibri sian buĝeton, ĝi tutsimple bankrotas... kaj la kondamninda akra kapitalismo kiu elvolvigas en la borsoj estas alia ĉapitro en nia sociordo. La funkcio de la ŝtato, klare ne povas esti tiu de produktado. Tion en kelkaj linioj de la revuo "LeExpress" montras ĵurnalisto Yann de ly Ecotais, eĉ se la nuna tendenco estas refortigi la monstren por pli bone ekspluati la respektivan popolon.


La ŝtato, nekonsfite, agnoskas ke ĝi estas malbona administranto kaj produktanto, tial prave ĝi privatigas, t.e. redonas la firmaojn al privata kapitalismo. Tiel la ŝtato povas pli facile kaj drasti postuli pli da impostoj por la netusebla feŭdo, kiu estas la ŝtato mem.

En la nuntempo la rolo de la ŝtato (cetere en la tuta mondo) estas krei la plej gravan feŭdan staturon, neniam antaŭe vidita en la homa historio. La popoloj ja ricevas la faŝismojn, la koruptojn, la ekspluatadojn, la politikajn regimojn, kiujn ili mentas.

FACILA

TRIMONATA SUPLEMENTO POR KOMENCANTOJ

I JARKOLEKTO - Nro 1



Tre facila, ĉu ne?

Jen Facila

FACILA - ĵus aperas! Bonvolu saluti ĝin ĉar ĝi ja estas via! Tiu ĉi trimonata gazeto estas kreita por ĉiu esperantisto kaj kiel ĝia nomo jam klarigas, ĝi restos facila revuo, tamen bona kaj alloga* instrua.

Ĉu vi deziras kaj pretas kunlabori kun ni? Se jes, sendu al ni simplan kaj allogan* rakonteton aŭ krucenigmon aŭ lingvan ludon, sed ne forgesu, ke ĉiuj tekstoj estu verkitaj surbaze en la vortlisto de *Kontakto*. Se vorto

kiu nepre devas esti uzata, ne troviĝas en la listo, donu piedpagan difinon.

Al tiuj, kiuj jam bone regas Esperanton ni petas, ke vi ne flanken lasu ĝin tial, ke ĝi al vi tro facilos. Bonvolu helpi al ni ĝin riĉigi, ĉar ni ĉiuj profitos* se ĝi bone efikos sur E-Movadon.

Jam de nun nian koran dankon!

LA GEREDAKTANTOJ: Maria Manuela - James Piton - David Bianchini

ALLOGA - altira
PROFITI - ricevi utilon

Enpensiga dubo

Ĉiumatene, Luko, kvinjara knabeto, atendadas la eniron de sia patrino en lia ĉambro, kie ŝi kisas lin kaj rigardos, almenaŭ dum momento, liajn allogajn* ludilojn kaj, kiu scias, ĉu ŝi legos al li bildkoloran libron?

Bedaŭrinde, kiel ĉiam, terura timo premas la patrinan koron. ŝi pensas esplori la veran religion sed ŝi ne scias kiu religio estas la vera. Kombistoj estas gajaj homoj kiuj multe parolas kaj ĉion scias, tial ŝi kutime iras al kombisto.

Iun tagon kiam ŝi alvenis hejme neniu estis en la domo. Bileto sur la nototabulo sciigas la jenon: "Mi estas portanta Lukon al kuracisto. Marta."

Kial Marta, la kuiristino, portis Lukon al kuracisto? La patrino timoplena kaj pala* tute ne scias kion fari. Kion diri al ŝia edzo preskaŭ alvenanta? Tamen unu, du, tri horoj forpasis kaj alvenis nek ŝia edzo nek Marta kun Luko. Time-ma ŝi eĉ ne kapablas preĝi, nur plori senĉese.

Finfine, ho kia feliĉo, ŝi vidas antaŭ ŝi Lukon en la brakoj de la patro. - Nenio grava, sinjorino, diris Marta, trankviligu. Luko falis el la stuparo sed dankjal Dio nur la brako doloros dum kelka tempo.

En la sekvanta tago la patrino frue eniris la ĉambron de ŝia filo, kisis lin, legis al li libron kaj restis kun li. Luko ne

sentis doloron.

Granda gojo plenigas la infanan koron.

Pli malfrue, kiam Marta pretigadis la mangajon, la patrino dankis sin. - Vi havas nenion por danki, sinjorino.

- Kial ne, (kontraŭdiris la dommastrino) vi helpis mian fileton. Mi dankas vin.

Marta gaje ridetis al ŝi kaj respondis: - Estas ne dankinde, mi nur faris mian devon, do mi estas feliĉa.

La patrino de Luko miris Martan kies vizaĝo lume ridetas. Subite ŝi demandis:

- Marta, ĉu vi estas religia?

- Jes, sinjorino, mi estas.

- Al kiu religio vi apartenas, Marta?

Marta iom ĉesis labori, rigardis la estrinon kaj respondis:

- Vere mi ne scias. Esti religia signifas ami al Dio, la naturon.

Ame servi al ĉiuj kaj ne nura akcepto de kredo - kaj timeme Marta reprenis la laboron.

La dommastrino iom restis enpensiga kaj post jam ĉe la pordo denove parolis:

- Dankon, Marta, vi ĵus helpis ankaŭ min.

ALLOGA - altira.
PALA - neruga, senkolora (vizaĝo).

MI ESTAS MI!



La germanoj, kiuj satas la F1-vetkurojn*, metas ĉiujn esperojn sur la manojn - kaj piedon - de la juna stelulo Michael Schumacher

La lastan 26-an de septembro, li estis la venkanto de la Granda Premio en Portugalio dank' al sia rapida aŭto BENETTON-FORD.

Li denove sin montras lerta kaj konkurema*. La bonaj finaj rezultoj en preskaŭ la tuta ĉijara monda ĉampioneco tion atestas: li okupas la 4-an lokon inter la F1-aŭtokuristoj.

Oni jam antaŭvidas lin kiel mondan

ĉampionon, ĉar tio ja eblos post ne multaj jaroj. Sportaj gazetoj de lia lando jam nomas lin "germana SENNA", sed li tuj reagis: "Mi estas Michael Schumacher, neniu alia."

ĈAMPIONO - venkinto en sportaj konkuroj.

GERMANO - homo, kiu naskiĝis en Germanio (ĉefurbo: Berlin)

KONKURI - batali por superi aliajn.

VETKURO - sporta kuro.

LA DU FRATOJ

La Laponoj diras, ke en la komenco la ĉefa Dio kreis du fratojn.

Ili vivis en lando de montoj kaj marĉoj*. Unue la vintro ne estis tro malvarma, ĝis kiam venis la unua nego-ŝtormo*. Ĝi daŭris tiel longe, ke ĝi minacis* tute kovri per nego la du fratojn.

Unu el la fratoj decidis kion fari. Li serĉis kaj trovis kavernon* en flanko de monteto kaj tie li restis ĝis la ŝtormo forpasi.

Sed la alia frato restis kaj luktis kontraŭ la eksteraj elementoj.

La vetero estis terura, tamen li sukcesis travivi la ŝtormon, kaj li fariĝis la prapatro de la Laponoj, kiuj elektis kiel sian landon la plej malvarman regionon sur la tero.

La frato, kiu sin tenis en la kaverno fariĝis la prapatro de la

Homoj de la Sudo. Tiujn la Laponoj serĉe nomas "Svedoj"* (Surbaze de la libro "Rakontoj el pluraj landoj" ĝin skribis Carlos Eduardo de Oliveira el la urbo Paulinia SP)

KAVERNO - natura subtera kavbo

MARĈO - terspaco kovrita de akvo

MINACI - timigi

SVEDO - homo de Svedio (ĉefurbo: Stockholm)

ŜTORMO - tro forta ventego

Ave, Asteriks!

"Ni trovigas en la jaro 50 a.K. La tuta Gaŭlujo* estas okupita de la romianoj*... Ĉu la tuta Gaŭlujo? Ne! Unu vilago de persistemaj* gaŭloj ne cesas kontraŭstari la okupintojn..." Atentu, ĉar komenciĝos nova historio, kie ne mankos frenezaj gaŭloj, multaj vojaĝoj, aproj*, festoj kaj disbatitaj romiaj militistaroj!

Dank' al la inteligenteco de Asteriks kaj al sekreta*

supernatura trinkaĵo de la druido* Miraklomiks (en la portugala: "Panoramix"), tiu vilago estas neatakebla. Liaj geamikoj - la estro Mostiks ("Abracurcix"), la kantist(ac)o Malmuziks ("Chatorix"), Veteraniks, Tutaŭtomatiks, Ordalfabetiks kaj multaj aliaj - ne perdas la okazon batali inter si, kaj ĉiuj kune kontraŭ la militistoj senditaj de Romo. Kompatinda Julio Cezaro! Simpla vilago sufiĉas por ridindigi liajn soldatojn.

Asteriks trovis sian plej bonan amikon en Obeliks, dika kaj mangema faristo de altaj stonaj gaŭlaj artaĵoj, la menhiroj. Kiel infaneto, Obeliks falis en ujon, kie restis iom de la magia* trinkaĵo. Ĝiaj efikoj estas konstantaj sur li kaj tial la druido malpermesas, ke li trinku ĝin - oni ne povas prikalkuli, kiel danĝera tio estas! Obeliks opinias tion granda maljustaĵo, ĉiuj povas gustumi la trinkaĵon, krom li...

Kvankam Obeliks ofte diras, ke li "fartas iom malforte hodiaŭ", tuj kiam li eniras en la arbaron, aproj kaj romianoj volas esti for: ĉasi ilin estas lia preferata sporto.



La du amikoj kaj la hundeto Idifiks vojaĝas al tre diversaj lokoj - de Egipto al Hindujo, de Grekujo al Nordameriko! Ĉiuj 30 historioj estas interesaj, ege amuzaj kaj plenaj je inteligentaj serĉoj. Ni vidas ĉion, kio okazas en nia nuna mondo, du mil jarojn antaŭe.

La revuoj, verkitaj de la francoj René Goscinny kaj desegnitaj de Albert Uderzo, jam

tradukigis en la portugalan. Ĝis nun, nur la unua estas tradukita en Esperanto; ĝin korektis William Auld kaj Reto Rossetti ("Asteriks, la Gaŭlo", Internacia tradukrondo, Delta Eldonejo SKLG [Stuttgart], 48 p.).

Niaj gaŭloj neniam maltrankviliĝas pri la fino de siaj historioj. Ili scias, ke fine en la vilago granda festo (kun sufiĉe da aproj por Obeliks) atendos ilin, sub stelplena ĉielo. Cetere tiuj kuraguloj, protektataj de siaj pli ol 400 dioj kaj diinoj, timas nur ion: ke la ĉielo falu sur iliajn kapojn! Sed la legantoj de ĝiaj historioj neniel permesos tion...

- a. K. - antaŭ Kristo
- apro - monta porko
- druido - gaŭla religiulo
- Gaŭlujo - lando de la gaŭloj (praaj francoj)
- magia - supernatura
- persisti - energie daŭrigi, malgraŭ malhelpaĵoj
- Romio - praa vastega regiono, kies ĉefurbo estis Romo
- sekreta - konata nur de malmultaj

Kuriozaĵo

Ĉu vi scias kiu estas via plej granda angulo de vidado? Ni povas movi niajn okulojn, tial do, kun la kapo senmova, ni kapablas vidi en angulo de 150 gradoj.

La noktuoj, kontraste, iliaj okuloj estas nemovaj, tial la pli granda angulo de vidado estas 50 gradoj.

Sed ne bedaŭru ilin!... Kial? Ĉar la noktuoj povas movi la kolon dekstren kaj maldekstren. Dekstren ili faras angulon de 270 gradoj kaj maldekstren ankaŭ angulon de 270 gradoj. Entute 540 gradoj!!! Vi povas fari eĉ ne duonon de tio!



Pruvi kion?

Antaŭ kelkaj tagoj, dum mi montris E-gazeton al amiko, mi demandis lin pri la jeno:

- Kion vi pensas pri ĉi tiuj politikaj artikoloj en niaj revuoj? Ĉu ni ne devas gardi nian movadon kaj agi tiamaniere, ke estonte neniu estro povos akuzi Esperanto pri enmiksigo en politikajn danĝerajn aferojn?

Mia bona amiko gaje ridetis kaj vive respondis al mi:

-Bone mi komprenas vin, sinjorino, sed mi pensas, ke jes ni devas skribi tiajn artikolojn, ĉar ili pravas, ke Esperanto taŭgas por ĉiuj aferoj, eĉ politiko.

- Kiam mia amiko foriris, lia respondo ankoraŭ sonadis en mia kapo.

Ĉu mi eraras? Kial mia koro diras al mi, ke tiuj aferoj ne estas bonaj al la vivo-tenado de Esperanto? Ĉu nun Esperanto ankoraŭ bezonas pruvon? Tute ne! Esperanto bezonas pruvon nenion!

Ĝi vivas forta ĉie en la mondo, kiel

lingva ilo taŭga por ĉiu afero, eĉ politika, sed ni esperantistoj devas zorgi ĝian "internan ideon", kiel Zamenhof nomis la animon de Esperanto. Paralele kresku kaj la lingvo kaj la animo sub la devizo de frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Ni zorgu, ke Esperanto restu pura en la lingvo, sed ne nur ĉar tio ĉi ne sufiĉas. Ne nur la lingvo allogas la korojn. Ĝia interna ideo devas resti neatakebla, ĉar ĝi ja korpigas la nuran forton, kiu kapablos detru la murajn inter malsamaj, rasoj kaj popoloj kaj nacioj.

DETRUI - ruinigi.

DEVIZO - mallonga frazo montranta principon de konduto.

GARDI - atenti, zorgi por eviti minacantan danĝeron.

PARALELE - per konstanta egal-distanco.

PRUVI - montri, ke io estas vera.

La Tabulo

Kiam knabeto mi estis petola*, plorema, malgentila kaj tute ne kunhelpis fari el nia hejmo paradizon*. Tute kontraŭe!

Kun senfina pacienco* kaj per multa amo miaj gepatroj konsilis min, sed mi neniam aŭdis ilin. Post multaj petolajoj iam mia patro vokis min por paroli. Tiam mi pensis ke li estis perdinta la paciencon kaj donos al mi punon aŭ min regalos* per batado. Li tamen ne faris tion, sajnne ne kolera kaj simple diris al mi:

- Filo, mi ekvidas ke vi havas nenian ideon pri via konduto*, sed mi pensis ion, kio povas montri al vi tre bone vian agomanieron kaj tiel vin helpi. Venu kun mi.

Li kondukis min al sia improvizita* metiejo* kaj tie li parolis:

- Rigardu, mi havas ĉi tie tabulon novan, glatan kaj belan. Ĉiun fojon kiam vi

malobeos aŭ malbone agos mi ĝin trapikos per najlo*.

Bedaŭrinda tabulo! Baldaŭ ĝi estis plena je najloj! Sed ĉiam kiam mi aŭdis mian patron batanta la martelon* mi eksentis internan premon.

Estis ne nur pro la perdo de tiu bela tabulo, tio ankaŭ estis al mi humiligo*.

Ĝis kiam en iu tago, jam malmulte da loko restis al aliaj najloj, mi kompatis la tabulon kaj el mia tuta koro deziris ĝin rigardi kiel ĝi antaŭe estis, bela kaj glata. Mi kuris al mia patro fari tiun konfesion kaj li sajnigis iom pensi kaj diris al mi:

- Ni povas ion pruvi. Je ĉiu fojo kiam vi bone agos, kiu ajn situacio, mi eliros najlon el la tabulo. Ni provu.

Unuope la najloj malaperis ĝis kiam post kelka tempo restis plu neniu.

Tamen mi ne ekgojis ĉar mi rimarkis, ke la tabulo kvankam jam tute sen najloj restis kun ĝiaj signoj. Mi diskutis kun mia patro pri tio kiu diris al mi:

-Estas vero, mia filo, la najloj jam ne restas sed ĝiajn signojn neniam oni povos malaperigi. La samo okazas al nia koro. Ĉiu malbona ago restigas en la koro doloran signon, kiu daŭras eĉ kiam ni ne plu malbone agas: estas la kulpo.

Neniam plu mi torgesis tiujn najlojn kaj la tabulon glatan kies beleco estis senrimede detruita*. De tiam mi plej zorgas, ke tiu sento de kulpo ne tiel signu mian koro. Tiu ĉi sperto pensigis min multe kaj mi estas certa, ke digna vivo rekte vivita povas ebligi korojn, ĝis la fino, resti libera el iu ajn najlo kaj el ĝiaj sinsekvaj signoj.

(El la portugala "E, para o resto da

vida..." de Wallace Leal V. Rodrigues.)

DETRUI - ruinigi

DIGNA - pro supereco, meritanta estimon.

GLATA - sen elstaroj sur la supro.

HUMILIGO - malfidigo.

IMPROVIZI - tuj kaj senpere verki.

KONDUTO - ago-marieco.

MARTELO - batilo servanta por enigi najlojn.

METIO - manlaboro.

NAJLO - pinta metala ilo servanta por fiksi objekton.

PACIENCO - eco de tiu, kiu eltenas malbonon.

PARADIZO - plej agrabla loko.

PETOLA - amuze, vigle ludema.

REGALI - bone trakti.

La sufiksoj IGI kaj IĜI




IGI

Sufikso esprimanta la agon de ia kaŭzo.
 UNUE LI EN-LIT-IG-IS SLIAJN GEFILOJN,

IĜI

Sufikso esprimanta ŝanĝigon de stato.
 POSTE LI EN-LIT-IĜ-IS MEM.



IGI

KIAM LI EL-PUT-IG-IS AKVON,



IĜI

SAMTEMPE EL-PUT-IĜ-IS TRI RANOJ.



ENIGMO

ENIGMO	AK	AK	AL	BO	DA	ED	EK	FA
FO	GO	ĜO	GO	GI	IN	IN	IR	IS
KA	KA	KA	KO	LO	MA	MO	NA	NI
PO	RA	SA	SA	SA	SA	SA	SO	SI
TA	TA	TE	UN	UR	VA	VI	VI	VO
								ZO

El la supraj 48 silaboj formu 24 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj:
 1. Nigra trinkaĵo. 2. Malmolajo de la fingroj. 3. Sin movi sur aŭ en akvo. 4. Parto de la korpo. 5. Meritanta. 6. Aro da domoj. 7. Purigi. 8. Objekto, kiu surkovras alian. 9. Konata. 10. Vivkunulo. 11. Difinita tempo. 12. Tranĉa aŭ pika rando. 13. Spico. 14. Havi en manoj. 15. Movigis de loko al loko. 16. Fluajo. 17. Ne okupata. 18. Doktrino de persono k. ties sekvantoj. 19. Estinta. 20. Liberigi el danĝero. 21. Trinkilo. 22. Granda. 23. Lavilo.
 La komencaj literoj de la vortoj formas popolan maksimumon el la E-Proverbaro de ZAMENHOF.

EKZERCO

Ĉu vi bone regas la adverbojn?

- PROVU: - En ĉiu el la sekvantaj frazoj, skribu adverbos anstataŭ la montritaj esprimoj.
 EKZEMPLE: En mia malvarma lando mi vivis KIEL FREMDULO.
 KIEL FREMDULO = FREMDULE.
- KIAM MI ESTIS INFANO, mi ludadis en ĝardeno.
 KIAM MI ESTIS INFANO = _____
 - La aeroplano SUR LARĜAJ FLUGILOJ flugas super la maro.
 SUR LARĜAJ FLUGILOJ = _____
 - La stormo brodis la ĉielon PER LUMAJ RADIOJ.
 PER LUMAJ RADIOJ = _____
 - Li rimarkis la akvon, kiu aperis EN ANGULO DE LIA BANEJO.
 EN ANGULO DE LIA BANEJO = _____
 - PLENA JE ZORGOJ, la patrino klinis sin sur la lito.
 PLENA JE ZORGOJ = _____
 - Si forviŝis la larmojn SUR MIA VANGO.
 SUR MIA VANGO = _____
 - DEMETANTE LA RINGON, ŝi indiferece foriris.
 DEMETANTE LA RINGON = _____
 - Oni povas malsani PRO DIVERSAJ INFLUOJ.
 PRO DIVERSAJ INFLUOJ = _____

RESPONDOJ:

- KIAM MI ESTIS INFANO = KIAM INFANE
- SUR LARĜAJ FLUGILOJ = LARĜE FLUGILE
- PER LUMAJ RADIOJ = LUMRADIE
- EN ANGULO DE LIA BANEJO = ANGULBANEJE
- PLENA JE ZORGOJ = ZORGOPLENE
- SUR MIA VANGO = MIAVANGE
- DEMETANTE LA RINGON = RINGODEMETE
- PRO DIVERSAJ INFLUOJ = DIVERSINFLUE

Bazaj Informoj

Kio estas Kastora Klubo?

Kastora Klubo estas internacia korespondanta klubo por infanoj kaj gejunuloj, kiuj konas aŭ lernas Esperanton (la unua organizado speciale por ili) kaj ankaŭ por plenkreskuloj. Ĝi estis fondita en la angla urbo Denton, sur kies blazono estas bildo de tiu simpatia laborema besto, kaj de tiu tempo ĝi igis simbolo de la klubo.

Ĝiaj ĉefaj celoj estas:

- disvastigi amikajn sentojn kaj rilatojn inter infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj de diversaj nacioj;

- ekkoni la vivon de samguloj el aliaj landoj, ties historion kaj kulturon, ktp.;

- instigi infanojn kaj gejunulojn lerni kaj uzi la internacian lingvon kaj labori por la lingvo kaj ties idealoj (frateco);

- praktike helpi al E-intruis-tantoj en ilia laboro.

Samtempe la klubo donas al la infanoj senton de apartenado al la E-movado.

Nun al la klubo apartenas ĉ. 6000 membroj el 60 landoj kaj la membraro konstante kreskas. Por fariĝi membro de la klubo oni devas skribi sian nomon, naskigdaton kaj adreson, sendi tiujn ĉi informojn al la klubo kaj deklari membrokoton aŭ alia formon de la helpo.

Ĉiun duan monaton Kastora Klubo eldonas la kluban bultenon sub la titolo "Kara Amiko". La bulteno konsistas el 16 paĝoj kaj enhavas lecionojn de Espe-

ranto, informojn pri klubo agado, leterojn de la membroj, facilajn legaĵojn, kanzonetojn, ludojn, versajetojn, ilustritan vortareton, konkursojn kaj enigmojn, adresojn por korespondado ktp.

Kastora Klubo havas sian Korespondan Servon - senpagan. Oni nur sendu la informojn pri nomo, adreso kaj ago. Tiujn ĉi informojn oni enmetos en la klubajn bultenojn kaj en la kluban adresaron.

Ĉe la fino de ĉiu jaro la klubo eldonas kaj dissendas la kluban adresaron al la membroj kun aktuale pagitaj membrokotizoj, kaj se estas tiaj eblecoj, ankaŭ al aliaj membroj.

La Kastora Klubo havas ĉe la propran sistemon de "sciencaj" gradoj: kastoreto, bruna kastoro, arenta kastoro kaj ora kastoro, kiujn la membroj ricevas laŭ siaj atingoj en la scio de Esperanto, aktiveco de korespondado kun eksterlandaj amikoj, partopreno en la E-aranĝoj k.s. La kastoroj de diversaj gradoj portas diversajn insignojn.

La klubon fondis en 1964 s-ro J.H. Sullivan en la urbo Denton. Nun li estas honora membro, la ĉiutagajn laborojn plenumas, kaj la klubon gvidas s-ino Barbara Chmieleŭska.

Kastora Klubo de Esperanto ul. Pulawska 3-11, PL-02-5145 warszawa, Polio/Polonia Eventoj, Majo(2)-93

La arkitekto kiu igis Curitiba-n unu el la plej bonaj urboj el la lando opinias, ke la samo povas okazi al la aliaj brazilaj urboj. Por Lerner, trifoje urbestro de Curitiba, tiu urbo estas neniu paradizo, sed afero partumita kun la logantaro, iu kolektiva revo. Tion li asertis al reportero Reinaldo Bessa, de taggazeto ĉe la sidejo de Instituto Jaime Lerner, kiun li fondis por doni tion kion li nomas "strategia vizado" al la afliktigitaj urbestroj kiuj al li sin direktas.

ESTADO - De kie ekaperis la ideo kaj projektoj kiuj faris Curitiba-n iu urbo respektata en la tuta lando kaj ĉe eksterlande?

JAIME LERNER - Mi trovas, ke ni povas esti kreiva kiam vi havas donitaĵojn, kiam vi havas konojn. Se vi dominas iun teknikon, vi povas esti kreiva. Mi superregas teknikon, kiu temas pri urba administrado. Mi opinias, ke unu el la fundamentaj aferoj estas pensi pri la civitano. Tio povas esti io obvia, sed ekde kiam ni komencas pensi sub la perspektivo de la personoj, iu kreiva mondo malfermas siajn pordojn al vi.

ESTADO - Kio estas la sekreto de Curitiba?

LERNER - Simplaj solvoj, sinergia agado. Ĉiu problemo ĉiam estis pritraktata kiel iu kompleta itinero. Ĝusta decido ĉe ĝusta momento. Ne voli havi ĉiujn respondojn. Ni ne povas esti superpovaj. Komenci transformon ja estas granda komenco. La sekreto de Curitiba estas tio: transformi la urbon en ĉiesan kaŭzon, en kolek-

INTERVJUO - JAIME LERNER

"La urbo devas esti iu kolektiva revo"



tivan revon.

ESTADO - Kion Curitiba povas "eksporti" al Brazilo rilate al solvoj?

LERNER - Mi pensas ke ĉiu urbo havas sian skalon. Ne temas pri specifa solvo sed la maniero solvi. Tiusence Curitiba restas kiel baza referenco por la brazilaj urboj. Mi neniam diris, ke Curitiba ne havas problemojn. Sed ĉi tie la popolo sentas sin respektata. Kiam ajn la civitano bezonas veturilon, tiam li havas altkvalitan servon. Li havas bonnivelajn lernejojn, kaj kiam li bezonas bazan helpon je sano, tiam li havas tion bonkvalite. Hodiaŭ 28% el la logantoj kiuj posedas aŭtomobilon uzas la aŭtobuson "Ligeirinho" (tre rapida). Ĉio tio igas la civitano senti, ke vivo en iu urbo ne temas pri nur survivado. Ekzistas tiu ludeca afero vivi en komunumo kaj ne nur labori kaj hejmeniri.

ESTADO - Sed kiel restas la

sociaj bezonoj kiujn ĉiuj urboj havas?

LERNER - Pli kaj pli la sangoj kiujn ni faras en la kampo pri infanoj, logeco, sano, edukado kaj vetursistemo estas konsiderindaj antaŭtenoj. Malgraŭ la konjunkture kaj struktura krizo, oni rimarkas, ke la civitano de Curitiba sentas sin gojigita pri la urbo. Se oni faras enketon, oni konstatastas ke la gojigitaj estas 98%.

ESTADO - Ĉe la civitano en mizera kvartalo?

LERNER - Ĉe la civitano en mizera kvartalo. Li sentas,

ke la urbo ofertas ion al li. La transportado estas iu redono al la digneco same kiel la infan-vartejo, kaj la lernejo. Kompreneble se vi veturos tra la urba periferio vi trovos lokojn kun seriozaj problemoj, sed la avanco estas nekontestebla.

ESTADO - Kian diagnozon vi faras pri la brazilaj urboj?

LERNER - Mi pluasertas, ke estas la urbo kiuj povas ŝangi la landon. Mi, kiu estas trairinta multajn urbojn, konstatastas pri iu tria mondo en kiu malgraŭ la krizo restas aktiveco, io okazas. Brazilo ankoraŭ havas energion kaj ne estas frenezumajo pensi, ke la urboj povas esti plibone pripensitaj.

ESTADO - Ĉu vi estas kandidato al la prezidanteco?

LERNER - Ne.

EL ESTADO DE S. PAULO

Historio

La unua internacia esperantista geedziĝo

Bernard Golden

Nuntempe anoncoj pri geedziĝoj inter esperantistoj estas ĉiutagaĵo en la esperanto-gazetaro. Jam delonge oni parolas pri "edzperanto", tre trafa vorto de la esperanta slango. Kompreneble, la plej interesvekaj nuptaj novaĵoj koncernas diversnacionojn, kiuj renkontiĝas en Esperantujo. Mi ankoraŭ ne sukcesis malkovri donitaĵojn pri la unua geedziĝo inter samnaciaj esperantistoj, sed versajne unua internacia geedziĝo okazis en 1899, kaj la novgeedzoj estis nordianoj. La edzo ĉe dufoje "edzperantigis", ĉar post la morto de lia unua edzino li denove edzigis al alilandanino en 1925. Ĝi estis filino de unu el la pioniroj de la esperanto-movado en

Rusio. Ĉu vi scias, pri kiu temas? Valdemar Langlet, pioniro de la sveda esperanto-movado, edzigis al Signe Blomberg, kun kiu li konatigis pere de Esperanto, la 3-an de aŭgusto 1899 en Arbo (Turku), Finnlando.

Langlet naskiĝis en 1872 en Lebro, Svedio, kaj esperantigis en 1890. Dum li ankoraŭ estis universitata studento, li kunfondis en 1891 la Esperanto-grupon en Upsalo. Post ĉesigo de la revuo "La Esperantisto" Langlet helpis lanĉi novan internacian gazeton "Lingvo Internacia" en 1895. Dum la sekvaj jaroj Langlet faris poresperantajn vojaĝojn tra Rusio, Turkio, Aŭstrio-Hungario kaj Germanio.

Post la morto de lia unua edzino en 1921, Langlet edzigis al Nina Borokvo en Moskvo en 1925. Ĝi estis la filino de la esperantista amiko de Langlet, Nikolaj Afrika-noviamenhof skribis al li pri la devenode Esperanto. Ankaŭ Borokvo "edzperantigis". Lia edzino estis la rusa esperantistino Antonina Justibnovna Ĉajkovskaja, kiu akompanis Langlet kiel esperanto-gvidistino dum lia vizito al Krimeo en 1895.

Represita en Eventoj (1/oktobro-93) el Bona Espero, vol. 1993/30 n-ro 1.

Interese...


George Orwell kaj Esperanto

En januaro, inter la rabatvendejaj libroj estis granda stoko da ekzempleroj de Orwell, aprobita biografio de George Orwell, aŭtoro de "1984" kaj "Bestofarmo".

La biografio enhavas interesajn informojn pri la (tute negativa) sinteno de tiu verkisto rilate al Esperanto, kaj al Lanti, fama franca esperantisto kaj fondinto de SAT, kiu estis onklino de Orwell. Laŭsajne, Orwell tiom malamis Esperanton, la solan lingvon permesitan en Lanti-hejmo, ke li konceptis "novparolon" (newspeak), la lingvan ilon uzatan de totalisma registaro en "1984" por limigi la pensadon de la popolo. Novparolo estis malica parodio de Esperanto, per kiu Orwell vengis sin kontraŭ Lanti.

Garbhan MacvAoidh, el Nova Irlanda Esperantisto, n-ro 2, 1993. Represita en Eventoj, Majo(2)-93.

Adriano



Esperantistaj artistoj



Sen titolo, Josenildo Marques(San-Paŭlo)

KRIPTOGRAMO

Post la solvo de la enigmo, oni trovos en la duonigraj kvadretoj, la literojn kiujn formas la nomon de la unua prezidanto de la cefa Esperanto-organizaĵo de la mondo. Numeroj egalaj, literoj egalaj. Ni cerbumu kune!

José Saraiva Matos
Speciale por Brazilia Heroldo

1	8	18	2	18	5	6		18	9	19
2	10	17	15	18	16		15	1	13	17
3	15	18	10	18		1	6	19	15	19
4	8	17	15		1	10	17	2	9	21
5	4	15		2	1	13	15	17	2	19
6			1	10	19	4	17	8	1	17
7	14	17	15	14	17		1	5	8	19
8	8	17	15	5		9	21	18	7	19
9	17	14	18		13	18	5	6	19	21
10	1	2		1	17	2	1	5	6	19
11	13		2	4	19	9	18	2	20	19
12		17	15	8	19	2	1	1	16	1
13	3	18	2	19	8	18	2			
14	13	19	2	6	18	2		1	12	1
15	11		16	15	18		17	2	6	17
16		17	8	10		19	2	18	6	19
17	15	19	2		1	15	17	2	6	19
18	8	17		4	15	17	16	19	15	19
19	9		13	19	8	19	14	1	9	19
20		17	2	17	6	1	13			
21	8	17	2	4	17	15		2	19	21
22			2	6	15		4	22	9	19
23		1	5	18	2	6	18	15	1	19

1 - En mezepoko, poeto - muzikisto 2 - Dolorkvietiga 3 - Privata instruisto, kiu trejnas lernanto al ekzameno. 4 - Kukoj faritaj el pasto kun pistitaj migdaloj kaj sukeroj 5 - Krano, per kiu oni povas dreni tubaron de kaldronego... 6 - Helena virnomo 7 - Kruda eraro en la uzo de la lingvo 8 - Revolucia kanto, fariginta la nacia himno de Francujo 9 - Modernaj formoj de abelujoj, kun moveblaj kadroj 10 - Specialisto pri la lingvo de indianoj 11 - Malgoja simpatio pro ies malfelico aŭ funebro 12 - Meti en harmonion 13 - Malofta, eksterordinara, stranga afero 14 - Deziri nenion alian ol tion, kion oni havas 15 - Ĉagrena 16 - Malgranda lampinono 17 - Tiu, kiu iras laŭ rondalino 18 - G. de olanacoj, kun grandaj kaj largaj folioj... 19 - Vapormotora provizita per radoj por sin movi sur vojoj 20 - Blande fervora kaj senindulge ekscesanta en religio 21 - Altrangaj diplomitaj cinaj statoficistoj 22 - Tiu, kiu tedante kaj genante, sin enmiksas en fremdan aferon 23 - Infekta inflamo de la intesto, kaŭzanta daŭra lakson

LETEROJ

San-Paŭlo, la 9an de novembro 1993.

Estimata Sinjoro
Fabrício Rodrigues Valle
Direktoro de Brazilia Heroldo

DIO ĈEESTAS!
JESUO ALVENAS!

Ekscianta pri tiu altvalora komunikilo, ni petas, bonvole, de vi, la disvastigado de nia agado de universala solidareco, frukto-done al Senlima Ekumenismo. Por tio, ni kalkulas je Esperanto kiel prezentanto de niaj deziregoj strebi por plibona kaj felica Homaro.

Ni kunsendas kelkajn informojn por ilustru niajn aktivecojn kaj refari al vi la peton rilate via gravega kunlaboro.

Nun nia plej grava celo estas efektivi en 10/12/93 en la urbo San-Paŭlo, la 1an Renkontigon "Vivi estas Plibona/Ne Uzu Toksajon". Ĝi estas ia kampanjo, kiu ĉefe celas atentigi la junulojn pri tia malbono, kiu ruinigas la mondan junularon. En tiu renkontigo certe ĉeestos miloj da homoj, kiuj strebas por plibona Brazilo liberigita de ĉi tiu terura malvirto. Felica junularo estas tiu, kiu scias, ke tiu grava okazaĵo, kiu de nun mobilizas milojn da homoj, interesos al viaj legantoj.

Atendante vian respondon, ni kaptas la oportunon por esprimi konsideron kaj estimon. Ni anticipas dankas vin.

Atente via

VIVU JESUO!
LA KRISTO ŜTATISTO!

Celso R. de Oliveira
Asesoro pri Internaciaj Aferoj de Legio de Bona Volo

La *jurnalo Brazilia Heroldo* taksas kiel tre altvaloran la agadon de Legio de Bona Volo kaj certe ni disvastigos ĝin ĉiam kiam estos eble.

**ANUNCIAR NO
BRAZILA
HEROLDO É
MAIS FÁCIL
QUE
APRENDER
ESPERANTO.**

Vai ser difícil você não fazer um anúncio no *Brazilia Heroldo*

PRAÇA TAMANDARÉ, 830, SALA 17
GOIÂNIA, GOIÁS